„КОВНО-ЭСПЕРАНТО“ ★★★ „KOVNO-ESPERANTO“

Журналъ Ковенскаго Общества Эсперантистовъ

★★★

Подписная цѣна: за годъ—1 руб., за 6 мѣс.—60 коп. Пожизненные и дѣйств. члены К.О.Э. получаютъ въ Ковнѣ журналъ безплатно. За перес. по почтѣ особо уплач.: за годъ—60 к. и за 6 мѣс. - 30 к.

Адресъ редакціи: Ковна, Б.-Садовая, д. Рацъ

★★★

Цѣна отд. №—3 коп., въ пров. и съ перес. 5 к.

★★★


Отъ 10 до 30 №№ въ годъ



№ 9 (23)

1913.

15 Іюня
28 Junio



Presorgano de Kovna Esperantista Societo

★★★

Abonprezo: Jare—1 sm., duonjare—60 sd. Dumvivaj kaj efektivaj membroj de K.E.S ricevas la ĵurnalon en Kovno senpage. La poŝtelspezoj —60 sd. p. jaro, 30 sd. p. duonjaro.

Adreso de Redakcio: RUSLANDO. KOVNA Esperantista Societo.

★★★

Unu ekz. - 3 sd., en provincoj - 5 sd., eksterlande - 7 sd.

★★★

Dum la jaro 10 - 30 numerojn.

Текущій счетъ въ Ковенск. Отдѣл. Соед. Банка (№ 916) и въ Esperantista Ĉekbanko

Ковна, 15 Іюня.

Очередная задача русскихъ эсперантистовъ—использовать во всей полнотѣ предстоящій съѣздъ въ Кіевѣ. Если послѣдній названъ вторымъ конгрессомъ, то на немъ лежитъ обязанность воспользоваться трудами перваго конгресса, который выработалъ нѣсколько мѣропріятій какъ разъ въ предѣлахъ опубликованной программы Кіевскаго конгресса. Главная и непремѣнная обязанность второго конгресса заключается, по нашему мнѣнію, въ составленіи и выпускѣ *обращенія* къ представителямъ власти, науки, печати и общественныхъ учрежденій, съ призывомъ обратить вниманія на эсперантское движеніе и оказать ему содѣйствіе, съ цѣлью скорѣйшаго введенія языка „эсперанто“ въ учебныя заведенія, а также въ научныя, дѣловыя и торговыя сношенія съ иностранцами. Въ этомъ отношеніи весьма кстати вышла въ свѣтъ прекрасная по полнотѣ свѣдѣній, правильности и ясности изложенія брошюра извѣстнаго русскаго

Kovno, la 15/28-an de Junio.

La nuna plej grava devo de rusaj esperantistoj estas—utiligi plene la venontan kunvenon en Kiev'o. Se ĝi estas nomita „*dua* kongreso“, ĝi devas profiti la rezultatojn de la *unua* kongreso, kiu ellaboris kelkajn gravajn decidojn, ĝis nun ne plenumitajn. Ĉefa kaj nepra devo de la II kongreso estas, niaopinie, jena: ĝi devas ellabori kaj publikigi alvokon al la aŭtoritatoj kaj reprezentantoj de la scienco, gazetaro kaj publikaj institucioj, petante atenti la esperantan movadon kaj helpi ĝin—por la plej rapida enkonduko de la lingvo „esperanto“ en lernejojn, same kiel en sciencajn, aferajn kaj komercajn rilatojn kun alilandanoj. Por tiu celo tre ĝustatempe aperis bonega—laŭ pleneco de sciigoj klareco kaj reguleco de stilo—broŝuro de konata rusa esperantisto

эсперантиста-пропагандиста г. Андреева, на которую мы обращаемъ вниманіе всѣхъ, кому дороги судьбы русскаго эсперантизма.

propagandisto s-ro Andrejev, pri kiu ni atentigas ĉiujn, kiuj sincere deziras sukceson al rusa esperantismo.

Хроника Общества

Kroniko de Kovna Esperantista Societo (Ruslando).

● La 5-an de Junio en loka komerclernejo, sub prezido de Direktoro s-ro A. A. Dmoĥovskij, en ĉeesto de Honora membro de K. E. S. s-ro A. M. Nedoŝivin, de Prezidanto de K. E. S. s-ro P. D. Medem kaj de Instruisto de Esperanto s-ro N. R. Biĉkov okazis unuaj en Ruslando ekzamenoj por lernantoj de la supre nomita lernejo.

En ekzamenoj bone sukcesis sep personoj al kiuj s-ro A. M. Nedoŝivin donacis po unu volumo de la verkaro de V. N. Devjatnin.

Post la ekzamenoj s-ro A. M. Nedoŝivin faris malgrandan paroladon, en kiu li klarigis la signifon de la Internacia lingvo por komercaj kaj aferaj rilatoj.

Dankante s-ron direktoron de lernejo, s-ro Nedoŝivin salutis lin, kiel unuan lernejestron en Kovno, enkondukintan instruadon de lingvo Esperanto en lernejon.

● Lastatempe, krom 72 esperantaj ĵurnaloj (vidu №№ 4, 5, 6, 7 kaj 8), ni ricevis la sekvantan:

73) Kiir (г. Нарва).

Изъ міра эсперантистовъ.

★ *Франція*. Пропаганднымъ союзомъ предпринята анкета о распространеніи Эсперантизма во Франціи.

Отвѣты удалось получить отъ 124 обществъ, которыми сообщено, что въ настоящее время ведется 370 курсовъ Эспер. языка.

45-ю городами выдавались субсидіи на пропаганду.

★ Французское О-во учителей насчитываетъ свыше 300 членовъ.

★ *Китай*. Въ Тянь Цзынѣ открыта роскошная гостиница и названа „Hotelo de Esperanto“

★ *Финляндія*. Въ газетѣ „Kulänlehti Perĥelukemista“, издаваемой въ г. Кеми—введенъ постоянный эсперантскій отдѣлъ.

★ *Петербургъ*. Новая группа эсп-овъ въ Институтѣ гражданскихъ Инженеровъ.

Въ настоящее время въ Петербургѣ существуютъ 9 студенческихъ группъ.

★ *Вознесенскъ*. (Херс. г.) Эсперанто преподается въ мѣстной гимназіи. Имѣется библіотека, состоящая изъ 100 книгъ и выписывается 7 журналовъ.

— *Могилевъ*. Эсперанто преподается въ Коммерческомъ училищѣ.

— *Астрахань*. Новое О-во подъ названіемъ: „Astraĥana Societo Esperantista“.

— 6000 учениковъ 94 Американшколъ желаютъ обмѣниваться открытками. Адресъ: F-ino Elva Hayden, R. F. D. or Street no. 2, Yamhill County, Oregon U. S. A.

II-a Tutrusa Kongreso Esperantista (en Kievo).

Karaj Samideanoj.

La antaŭnelonge proektita II tut-

ruslanda Kongreso Esperantista estas jam efektivaĵo. Ministro de Internaj Aferoj permesis ĝin kaj oficialigis jenan laborprogramon:

1) Ĝenerala propagando.

2) Instruado de esp-o en ŝtataj lernejoj.

3) Esp-a librovendado kaj libreldonado.

4) Organiziĝo de ruslandaj esp-istaj institucioj.

5) Organizo de ruslandaj kongresaj.

Diskutado kaj raportoj estas permesitaj en lingvoj rusa kaj esperanta. Konspektojn de legotaj raportoj volu prezenti ĝis la 2-a de aŭgusto en ambaŭ lingvoj aparte.

Programo de amuza parto konsistas el:

1) Vespera propaganda vizito al Tutrusa Ekspozicio.

2) Dua vizito al Ekspozicio (tage).

3) Du ekskursoj tra la urbo, kiuj okazos laŭ kontrolita plano tiamaniere, ke la kongresanoj konatiĝos kun ĉiuj rimarkindaĵoj, posedantaj historian, artan aŭ naturbelan intereson, neniom laciĝante.

4) Ŝippromenado sur Dnjepr

5) Simfonia koncerto en Negocista Ĝardeno. Ravanta panoramo de la rivero, iluminita urbo kaj haveno. Ges-roj Privat, Parrish, Pitlik k. a. vojaĝantoj admiris tiun pitoreskan vidaĵon.

Respondante al demandoj kaj esperante pri multopa alveno de samideanoj, O. K. komunikas jenon:

Alveno. Preferinde estas veni la 16-n, ĉar la malferma kunsido okazos la 17-n matene. De stacio ĝis hotelo droŝko—50 kop. ĉiu pakaĵo—10 kop. pli. Tramo—5 kop.; linio № 2 iras rekte ĝis hotelo. Manporteblaj pakaĵoj estas permesataj sur antaŭa platformo.

Loĝado en hotelo „Kane" (Esp-ia entrepreno) de 90 kop. tage. Laŭvole plena pensiono.

Manĝado kunvianda laŭ diversaj prezoj. Tagmanĝo de 25 kop. Vegetara: matenmanĝo 15—20 kop. tagm. 25—35 kop.

Kartoj provizoraj estas sendataj tuj post ricevo de kotizo (Rb 3.00) ĉe kasisto Яковъ Бородкинъ, Dumskaja pl. magazin Okladĉik, Jakov Borodkin.

Familianoj de kongresanoj povas pagi nenion sed ricevos nek balotvoĉon nek raporton.

La Organiza Komitato ĝojas danki Doktoron L. L. Zamenhof kaj multajn samideanojn, esprimintajn aprobon al la iniciato. Ĝi dankas tiujn, kiuj enskribiĝis kaj alsendis raportojn. Ĝi dankas la finnajn esperantistojn, kiuj promesis veni kiel gastoj kaj esperas ke same venos la polaj kaj eksterlandaj.

Venu samideanoj. Bono de ruslanda esperantismo de vi dependas. Venu. Kiev, la Verda Urbo, vin inde akceptos.

Sekretarioj-organizantoj:
G. Jaĵgunoviĉ.
M. Kiperman (Kuznečnaja 69).
V. Traĉevskij. (B. Podvalnaja).

БИБЛІОГРАФИЧЕСКІЙ ЛИСТОКЪ.
Bibliografio.

La Verkistojn, kiuj deziras, ke „K. E." raportu pri iliaj eldonaĵoj, ni petas sendi al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.

Novaj libroj ricevitaj de ni por recenzo:

1) *Tra la mondo*. Geografiaj monografioj. Volumo 1. Pompei (Italujo) kun 45 bildoj. Prezo 0,-6 Sm.

2) Ekspozicio internacia pri maraferoj, mara higieno kaj Itala elmontro kolonia.

3) *Н. Кабановъ*. Полный эсперантско-русскій словарь. Цѣна 70 к.

Grava Alvoko

Al la profesiaj geprofesoroj kaj geinstruistoj-esperantistoj!


Aliĝu ĉiuj al la Internacia Asocio de Instruistoj!

JARA KOTIZAĴO: 1 Sm. (2.50 fr.)

Internacia Asocio de Instruistoj celas: 1) propagandi Esperanton inter geinstruistoj kaj inter gelernantoj; 2) helpi la alproksimiĝon de geinstruistoj kaj gelernantoj ĉiulandaj; 3) per internaciaj rilatoj helpi la disvolviĝon kaj solvon de pedagogiaj kaj profesiaj demandoj; 4) eldonadi aŭ helpi la eldonadon de gravajverkoj pedagogiaj kaj libretoj por gejunularo, k. t. p.

La ĉefa rimedo de I. A. I. estas ĝia oficiala, monata organo **„Internacia Pedagogia revuo“**, redaktata tute en Esperanto de profesiaj kunlaborantoj diverslandaj kaj diversnaciaj. Ĝia enhavo konsistas el: 1) artikoloj pedagogiaj; 2) lernejo kaj insruistoj 3) Internacia Asocio de Instruistoj (oficialaj raportoj); 4) literaturo: a) pedagogia, b) profesia, c) por junularo; 5) diskutejo (sole por aferoj profesiaj aŭ pedagogiaj); 6) notoj kaj informoj; 7) adresaro de geinstruistoj; 8) bibliografio.

La Revuo alportas ne nur artikolojn orginalajn, verkitajn speciale por ĝi, sed ankaŭ tradukaĵojn kaj estraktojn de gravaj kaj internacie interesaj artikoloj kaj sciigoj, ĉerpitajn el la plej bonaj pedagogiaj revuoj diverslingvaj. Membroj de I. A. I., kiuj pagas jaran kotizaĵon 1 Sm., ricevas la Revuon senpage; nemembroj por jara abono 1.500 Sm.—Redakcio kaj adm: J. Jacobs, kasisto de I. A. I., Boomsche Steenweg, 444, Antwerpen, Belgujo, kie oni povas ricevi ankaŭ specimenan kajeron, post alsendo de l'internacia respondkupono.



MIKSAĴOJ.
(Смѣсь).

FORMIKARO.
(Муравейникъ).

Съ тѣхъ поръ, какъ двѣ недѣли тому назадъ я написалъ про муравьевъ, одна идея сверлитъ мой мозгъ. Я ее сегодня сообщу читателямъ „Lingvo internacia“ и если она будетъ имѣть успѣхъ, я распространю ее при помощи другихъ газетъ.—Предлагаю учредить пропагандное общество подъ названіемъ „эсперантскій муравейникъ“ (E. F.=Esperantista Formikaro). Это будетъ общество не офиціальное, безъ предсѣдателя, секретаря, безъ ежегодныхъ членскихъ взносовъ. Члены его будутъ связаны только простымъ обѣщаніемъ вербовать *ежегодно по одному* изъ своихъ родныхъ или знакомыхъ и *самому* ихъ обучить эсперанто. Обученіе мы начнемъ сейчасъ послѣ Бернскаго конгресса, а результаты подсчитаемъ на Парижскомъ (1914). По истеченіи года завербованные должны въ свою очередь стать муравьями, а мы сами въ это время продолжаемъ вербовать другихъ. Понятно, не всѣ дотащатъ свое зерно до муравейника. Сто сѣмянъ потеряется, тысяча ихъ потеряется; нѣкоторыхъ муравьевъ раздавитъ тяжелая нога бездѣйствія, равнодушія и малодушія. Однако, я полагаю, что дѣло это можетъ дать важные результаты, разбудить нашу дремлющую дѣятельность и усилить наши слабыя группы. Попробуемъ, дорогіе друзья. Если Вы согласитесь, то пошлите мнѣ лишь открытку*) съ вашимъ адресомъ (конечно имя и фамилія) и начальными буквами нашего названія „E. F.“ И мы посмотримъ..

Изъ „Lingvo internacia“ (Era).

*) Отъ редакціи. Адресовать: Paris 33, rue Lacépède „Lingvo internacia“. Al Sinjoro Era.

Издатель *Ковенское Общество Эсперантистовъ.*
Редакторъ *М. С. Валентиновъ*

„Тов. Тип. М. Соколовскаго“ въ Ковнѣ